

# BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO KAJ DE LA BULGARA ESPERANTO INSTITUTO

Препоржчано отъ Министерството на Народната просвета за училищнитѣ библиотеки съ окржжно № 1870 отъ 27. януарий 1922

Jarabono: 20 bulgaraj levoj

1 sv. fr. aŭ egalvaloro

Adreso: Sofio, Poŝkesto 233

Anoncoj: 2 levoj je kvadrata

cm. Anoncetoj: 1 levo je vorto

Redaktoro: Sim. St. Hesarčiev

## Kiel propagandi?

Iufoje niaj samideanoj plendas, ke la socio ne atentis Esperanton kaj malzorgeme rilatas al ĝi, ke Esperanton oni opinias malserioza kaj nenecesa. Rigardu la vivon, la praktikon kaj serĉu la kialojn. Kial oni tiamaniere rilatas al Esperanto? Ja ni havas post ni ĝian historion, vivon, batalon kaj multajn venkojn en la daŭro de 45 jaroj; ni havas organizaĵojn — landajn kaj internaciajn; ni havas niajn multajn gazetojn, ĵurnalojn kaj revuojn; Esperanto foris ĝis nun multegajn praktikajn servojn al vojaĝistoj, turistoj, ideaj movadoj, al sciencistoj k. t. p.

La kialon ni serĉu unue ĉe ni. Ni demandu nin: „Kiel prezenti Esperanton al la vasta publiko?“ La respondo estas: prezenti ĝin en ĝiaj praktikaj servoj kaj utileco, en ĝia literaturo kaj spirito. Por prezenti ĝin tiel ni bezonas personojn seriozajn kaj instruitajn. La kaŭzo kial la socio



Айфеловата кула (по случай 24 Всемиренъ Еспер. Конгресъ въ Парижъ)

ne ĉiam favore rilatas al Esperanto estas tiu ke neseriozaj personoj ĝin prezentas en multaj okazoj

La estimata universitata profesoro s-ro d-ro Al. T.-Balan, kiu antaŭ jaroj estis kontraŭulo de Esperanto, nun vidante la praktikajn servojn, kiujn ĝi donas diris ke, „efektive Esperanto estas lingvo en skatolo, kiun oni povas ĉien porti kaj uzadi“.

Vastajn rondojn por nia propagando prezentas la lernantaro. Grandega estas ĉe ili la intereso al la lingvo, kiu donas flugilojn al la spirito por transflugi la landlimojn por vidi, sperti kaj ekkoni la mondon, la homaron por eksenti la pulson de la intensa internacia vivo. La servoj,

kiujn Esperanto proponas pri la lernado de geografio, lingvoj k. a. ne estas neglektindaj.

Kaj efektive ni vidas, ke dum la lasta jaro en multaj gimnazioj oni gvidis kursojn, oni fondis societojn kaj Esperanto diskonigis kaj popularigis.

Al tiu rondo de nia propagando ni direktu niajn fortojn serioze por paroladoj, kursoj, elmontrante la praktikajn kaj sciencajn utilojn, kiujn portas la lingvo.

Ni estu pretaj dum la venonta jaro por tiu pli vasta kaj serioza laboro!

*Sim. St. Hesapčiev*

## Областни есперантски конференции

Такава устройва д-во „Radio“ в Т.-Пазарджикъ

**На 7 и 8 май** — последните дни на великденската ваканция. Конференцията ще се занимае съ организационни и езикови въпроси. Поканватъ се съидейниците отъ околните села и градове да присъствуватъ. За общо жилище д-вото ще се погрижи. Въ недѣля на 8 ще се направи полудневенъ общъ излетъ до Ели-дере.

Втора конференция ще стане въ гр. **Ямболъ** на сжщитѣ дати. Устройство се краткъ излетъ изъ околноститѣ на града.

Своевременно д-вата ще разпратятъ покани до съидейниците въ близкитѣ села и градове.

## 24-a Univ. Esp. kongreso

Парижъ 30 юлий — 6 августъ 1932 г.

Пжтуването отъ София до Парижъ въ третокласни вагони ще струва:  
До Драгоманъ 70 лв.

Презъ Югославия 1118 “

„ Австрия 886 “

„ Швейцария 530 “

Презъ Франция до Парижъ 495 “

София — Парижъ 3099 лв.

Крайните станции въ всѣка страна сж:

Югославия: Царибродъ — Jesenice;

Австрия: Rosenbach — Buchs;

Швейцария: Buchs — Basel;

„ Basel — Petit-Croix;

Франция: Petit-Croix — Paris.

Този е най-краткиятъ пжтъ. Като се сметне отстѣпката въ Франция 50% — около 200 лв. и въ Австрия 25%, въ случай, че пжтува група отъ най-малко 8 души — около 200 лв. пжтуването ще струва около 2700 лв. Очаква се да получимъ намаление и въ другитѣ страни.

## Esperanto malserioza?

Juna pentrartisto deziras viziti Parizon por vidi famajn bildojn en la riĉenhavaj muzeoj. Ĉar li estas malriĉa homo, li intencas fari tiun ĉi multe deziratan ekskurson kune kun esperantistoj, kiuj vizitos la 24-an universalan kongreson dum aŭgusto. Li aĉetis esperantan lernolibron kaj komencis la preparon de la financa afero.

Foje, mi klarigas al mia amiko la aranĝon de venonta kongreso, montrante al li sciigon, presitan en la esperanta gazeto. Li provas legi la tekston, ankoraŭ ne konata bone al li. Je nia interparolo ĉeestas ankaŭ lia amiko.

— Ĉu vi lernas Esperanton, demandas li, ridetante.

— Jes mi intencas lerni ĝin.

— Mi opiniis vin pli serioza! Kial vi perdos vian tempon?

Por kio tiu ĉi malserioza lingvo taŭgas?

— Permesu, ke mi respondu, kamarado, mi diris.

Mi ne parolos al vi pri la uzado de Esperanto en komerco, en turismo kaj vojaĝoj, en internaciaj kunvenoj kaj kongresoj, nek pri ĝia uzado de tramkonduktoroj kaj policistoj, de blinduloj kaj malliberuloj. Ne, mi donos al vi ekzemplojn el via konata sfero. Ĉar vi estas studento, do homo de scienco, mi prezentos al vi okazojn de uzado de Esperanto en la kampo de scienca interkomunikado: meteorologia kaj aerologia observatorio en Japanujo presigas siajn raportojn destinitajn por fremdlando nur en Esperanto. Ĉiujare presata bulteno ne estas kelkfolia broŝuro, sed kelkcentpaĝa bonege aranĝita scienca verko. Eĉ nia universitato en Sofio po-

sedas jam numeron de tiun ĉi raporto.

Ankaŭ en Japanujo oni e'donas revuon pri Eŭgeniko (scienco, celanta plibonigi la homajn rasojn). Ĝi estas presata en du lingvoj: Japana kaj Esperanto.

En Ameriko oni komencas eldoni esperantan sciencajn revuon. La unua numero, kvankam modesta, estas tre interesa.

Franca inĝeniero, eltrovinto de nova kaj perfekta motoro por aviadiloj, penege laboranta homo, trovis tempon ellerni nian lingvon kaj uzas ĝin.

Jen, kolego, estas homoj inter seriozaj sciencistoj, kiuj ne konsideras Esperanton malse-rioza kaj bagatela afero. Sed, kolego, bonvolu diri viajn argumentojn kontraŭ Esperanto.

— Argumentoj? Argumentojn mi ne havas, mi nur tiel... diris...

Gimnazia profesorino de franca lingvo vidas verdajn stelojn sur la brustoj de du el siaj lernantoj.

— Ah, ĉi-tie estas esperantistoj, ĉu vere, ĝis nun mi ne supozis, ke inter miaj lernantoj estas personoj, kiuj lernas ankaŭ aliajn fremdajn lingvojn krom la franca. Sed, diru al mi por kio taŭgas via Esperanto?

— Ekzemple, mi korespondas kun fremduloj, sinjorino.

— Kun fremduloj? De kia nacio ili estas?

— Inter miaj korespondantoj estas fino, ĉeĥo, japano, germano, amerikano, polo, aŭstraliano...

— Japano kaj aŭstraliano? Ĉu vere en Japanio kaj Aŭstralio estas esperantistoj?

— Jes sinjorino.

— Sed... sed mi aŭdis, ke Esperanto estas malserioza miksaĵo de diverslingvaj vortoj. Ek-

zemple, duru al mi esperantan vortojn prenitajn de franca lingvo.

— Manĝi, aperi, persekuti, viando, kuraĝo, pano...

— Sed, kial vi opinias, ke „manĝi“ estas pli bona ol „manger“ kaj „pano“ ol „pain“?

— Sinjorino, la artefarita internacia lingvo devas havi propran spiriton. La vortoj estas submetitaj al tiu spirito. Krom tio, ili havas finaĵojn, kiuj ne estas francaj aŭ germanaj, sed ĝuste la egalaj finaĵoj por ĉiuj verboj, ekzemple, aŭ por ĉiuj substantivoj faras Esperanton tre facila kaj logika.

— Sed, eĉ por la lernado de logika internacia lingvo oni ne devas perdi sian tempon. Via lingvo neniam venkos la francan kaj anglan en la kampo de internaciaj komerco kaj politiko.

— La estonteco montros kiu el ili fariĝos vere internacia. Sed permesu, sinjorino, ĉu nun estas nur du internaciaj lingvoj, franca kaj angla? Germanoj havas alian opinion, hispanoj, italoj ankaŭ...

— Vere, sed ni ellernu bone almenaŭ unu el la nunaj internaciaj seriozaj lingvoj.

— Mi preferas „malseriozan“ Esperanton, ĉar japanoj ne scias la hispanan kaj aŭstralianoj — la francan. Per alia lingvo mi ne povas korespondi kun ili.

Karaj samideanoj, verŝajne ĉiu el vi povas rakonti similajn kaj eĉ pli interesajn ekzemplojn. Nia lingvo estas taŭga por internaciaj rilatoj en ĉiuj kampoj de la homa agado. Ĉiutage niaj adeptoj plimultiĝas. Sed, estas ankaŭ kleraj kaj justaj homoj, kiuj konsideras esperantistojn malseriozuloj. Bedaŭrinde, en multaj okazoj ili estas pravaj.

Ni diru, ke malseriozeco de iuj

esperantistoj ne pruvas malseriozecon de Esperanto. Sed, bedaŭrinde, la homoj ĉiam ligas la ideon kun ĝiaj adeptoj.

Jen, sinjoro X. malfermis esperantan kurson en urbeto Y, sed li mem ne scias, almenaŭ mezbone, ia lingvon. Kiu instruisto de franca aŭ germana instruas aliajn personojn antaŭ ol li mem bone ellernis la lingvon?

Sinjoro A. estas adepto de ĉiuspecaj „ismoj“. Adepto ankaŭ de Esperanto. Li propagandas: ĉiam kaj ĉie. Li babiladas ne subtenante siajn vortojn per seriozaj argumentoj, li eĉ tedas al homoj, kiuj aŭskultas lin. Li ne vidas efikon de sia laboro, sed, ĉar li estas idealisto, li senĉese propagandas. Komprenoble, tiuspeca varbado malproksimigas la homojn de niaj ideoj kaj lingvo.

Samideanoj, ni estu idealistoj, ni propagandu senlace, ni gvidu kursojn, sed nur kiam ni sufiĉe bone, aŭ almenaŭ mezbone scipovas la lingvon. Ni parolu pri la avantaĝoj de sendependa internacia lingvo kaj pri ĝia multflanka uzado, sed antaŭe ni bone informiĝu pri la faktoj, ni fine argumentu niajn vortojn. Ni estu seriozaj. Ni memoru, ke Esperanto estas granda ideo, kiu neniam mortos, sed ĝi ne venkos plene ĝis kiam malseriozuloj propagandas ĝin! L. J.

**50% ОТСТЪПКА! 50%**  
**ДВОЕНЪ РЕЧНИКЪ И**  
**БЪЛГАРСКА АНТОЛОГИЯ**  
 праща срещу 105 лв. (съ нал.  
 платежъ 120 лв.)

Авторъ-Издательтъ: Ив. X. Кръстановъ, „6 Септември“ 2, София

## Kiel viviĝi esp. societojn?

La praktika uzado de la internacia lingvo estas la plej efika kondiĉo por viviĝi la esp. societojn. En Bulgario estas multaj esperantistoj, sed ne ĉiuj estas organizitaj, kaj la organizitaj, ne ĉiuj laboras vigle en la societoj.

Mi opinias, ke estas jam tempo kompreni, ke sen organizaĵo — ni ne povas fari tion, kion ni povas fari kun organizaĵo libera, sed kun disciplino. La esperantaj organizaĵoj en Anglujo, Svedujo, Germanujo, Estonio kaj aliloke estas belega ekzemplo kion povas fari ankaŭ ni — se ni komencus labori kune. La esp. societoj en Anglujo ekzemple, kvankam ili ne estas tre multnombraj, laboras vigle kaj havas bonegan disciplinon; ĉiuj anoj pagas sian kotizon siatempe; en Londono krom la ĝenerala sekretario, oni havas ankaŭ kelkajn oficistojn pagatajn. La societo havas grandan bibliotekon — preskaŭ ĉiujn esp. librojn, gazetojn, revuojn vi povas trovi en ĉi tiu biblioteko. Kaj ĉiuj esperantistoj de la tuta lando povas legi kaj utiligi ilin. Jen la unua tasko de la Bulgara Esp. Asocio: esperanta biblioteko, el kiu povas ricevi ĉiuj samlandanoj librojn. Tiam multaj bulgaraj geesperantistoj havus eblecon perfektigi. Ĉiu societo, en ĉiu urbo kaj vilaĝoj devas kaj povas havi pli malgrandan esp. bibliotekon — elektitajn librojn, revuojn, gazetojn. Tiu biblioteko estos kiel magnito, kiel centro. Mi vidis en Tallin ĉirkaŭ 80 geesperantistoj vizitas la kunvenojn ĉar la anoj havas praktikajn interesojn. Ili ricevas de la bibliotekistinoj librojn — la plej novajn kaj interesajn, ankaŭ la plej malnovajn kaj historiajn; ili havas sekciojn: literaturan, turistan, teatran, abstinencan k. t. p.

Por vigligi, viviĝi la esperantajn societojn — do la unua kondiĉo estas, ke ili estiĝu popoluniversitatoj — por memperfektiĝo kaj memedukado. Per diversaj literaturaj, sciencaj, pedagogiaj, sociaj verkoj, revuoj kaj gazetoj — ĉiuj anoj de la mensa, internacia vivo. Alia kondiĉo estas: en ĉiu societo ni uzadu la internacian lingvon praktike por vekti intereson ĉe diversaj internaciaj societoj — per la ligoj, kiujn ni povas havi per Esperanto. La abstinenculoj, la laboristoj, la instruistoj, la turistoj, la vegetaranoj, la pacifistoj, la amikoj de la kooperativoj — ĉiuj trovu tuj per Esperanto la praktikan utilon Tiamaniere en la pli multnombraj esp. societoj nature estos kelkaj sekcioj, sed ĉiuj ili estu unue membroj de la granda esperanta familio.

Esperanto havas la grandan mision enporti en la vivon — nacian kaj internacian, la *harmonion*. La vera esperantisto estas antaŭ ĉio *homo*, li havas toleremon, lia animo estas larĝa, li estas ĉiam progresanta, ĉiam li vidas la bonan flankon en aliaj — kaj tial li laboras por unuiĝo de la homoj kaj popoloj.

La bulgara popolo estas tolerema; la bulgaraj esperantistoj devas doni kaj ili povas doni la ekzemplojn de komuna laboro de ĉiuj progresemuloj — abstinenculoj, vegetaranoj, amikoj de la paco, turistoj. Esperanto estu unu ligilo inter ĉiuj idealistoj — por praktika, ĉiutaga vivo! La turistoj en Estonio kaj Svedujo jam utiligis bonege Esperanton! La instruistoj en Germanujo kaj Anglujo sendas siajn infanojn gastoj. Do Esperanto en praktiko!

La esp. societoj estu unu ligilo de ĉiuj novaj, progresemaj, internaciaj movadoj! P. G. Pamporov

## Printempo

1.  
Printempo. La suno radias  
kaj fluge portiĝas mil sagoj  
el fajro kaj feraj melodioj  
al montoj, kamparoj kaj lagoj.

Volupte sin kisas mir-floroj  
en freŝa kaj brila mateno  
kaj dancas pasie koloroj  
kaj sonas fanfaroj printempaj.

3.  
Mi volas en tiu ĉi horo de floroj kaj ĝojo  
mildigi la penon de nia ĉagrena popol'  
kaj firme ekiri—kun hela standardo—sur vojo  
al land' de eterna printempo kaj brila aŭror'.

2.  
Jen rozoj skarlataj bruliĝas  
en flamoj, fajregoj kaj briloj  
kaj super la tero portiĝas  
ĝoj-krioj kaj gajaj bird-triloj.

La tero facile nun spiras  
post grandaj turmentoj kaj laco  
kaj arde—plenvole—sopiras  
beatan trankvilon kaj pacon.

*Parsifal*

## Verda mozaiko

1.  
Nova epoko de brila supreniro  
kaj grandskala movado malko-  
vriĝas antaŭ la rigardoj de l'bul-  
garaj esperantistoj. Vigla propa-  
gando kaj intensa disvastiĝo de  
Esperanto en nia lando atestas  
pri tio. Dekoj da kursoj en multe,  
tre multe da urboj, urbetoj kaj  
vilaĝoj manifestas la feran volon  
de niaj samideanoj.

Bolas forta esperantista vivo.

2.  
Sed nia volo ne haltos tie ĉi.  
La granda kaj vasta labor-  
kampo vokas laboremulojn. Ni  
devas oferi niajn tempon, forton  
kaj energion por la venko de  
nia idealo: internacia helpa lin-  
gvo. —

Ankoraŭ pli intense.

Ankoraŭ pli sindone.

3.  
Multaj batalis antaŭ ni. Kaj  
multaj batalos post ni.

La grizaj haroj de niaj mal-  
novaj kaj maljunaj samideanoj

rememorigu al ni pri la obstina  
batalo kiu estis. La energiaj  
vizaĝoj de niaj junaj amikoj donu  
al ni impulson al plua batalado  
kaj firman kredon je nia venko.  
Ĉar ni devas venki.

4.

Ni havas nian Asocion. Ni  
posedas nian Instituton. Al ni  
apartenas nia gazeto.

Ĉu vi faris la eblon por ili?—  
Via loka societo aliĝis al BEA. Vi  
kunlaboras en BEI. Vi abonis  
al BE. Aŭ — vi restos senparto-  
prena en la konstruado de l'  
majesta monumento de Espe-  
ranto-movado en Bulgario?

Memoru ĉiam: ni venkos nur  
se ni estas organizitaj, discipli-  
nitaj kaj konkordaj.

5.

Niaj provincaj samideanoj  
devas forgesi la malnovan ku-  
timon: atendi ĉion de CK de  
BEA. La centra komitato estas  
nura peranto kaj plenumanto  
de niaj kongresdecidoj kaj dez-

## Причастията на Есперанто

Причастията на Есперанто образуват една система, която въ подробности и по броя на формитѣ си се доста различава отъ тѣзи на другитѣ езици. Затова ще бжде добре да ги разгледаме подробно, тъй като тѣ представляватъ значително богатство за Есперанто.

Преди всичко какво наричаме причастие? Причастие е форма сждържаща елементъ глаголенъ и имененъ. Въ много граматики ще намѣримъ, че причастието е отглатолно прилагателно, или приблизително сжщото. Това опредѣление на Есперанто не подхожда, защото имаме отглаголни прилагателни, които не сж причастия напримѣръ: *montra fingro, parola metodo*. Отъ друга страна не можемъ да възприемемъ термина „дѣепричастие“, защото на него отговарятъ и страдателни форми, които не можемъ да наречемъ „страдателни дѣепричастия.“ Причастията сж отглаголни форми и на Есперанто иматъ форма на сжществителни, прилагателни и наречия, обаче имаме отглаголни сжществителни прилагателни и наречия, които не сж причастни такива:

*iresprimoj societaj. Spontanee el malsupre devas naskiĝi kaj desegniĝi ĉiuj grandaj celoj de nia enlanda movado.*

6.

*En la brilaj horoj de l'estontaj tagoj la venko alvenos. Firme kaj neeviteble kiel konsekvenco de niaj penoj kaj luktoj. Tiam ni jubilos kune kun la tuta homaro kaj benados la pionirojn.*

*Kaj super ĉiuj landoj de l'mondo sonoros la dolĉa parolo de l'Espero!*

*Stefan Masârov*

*La vojaĝado estas agrabla.*

Пѣтуването е приятно.

Съ тази представка „ad“ се образуватъ множество отглаголни сжществителни. Сжщо такава е и „skribaĵo“.

Отглаголни прилагателни:

*Lingvo skriba kaj parola.*

Езикъ писменъ и говоримъ.

Отглаголни наречия:

*Li montris tion parole kaj fage.*

Той показа това на думи и на дѣла.

Ние даваме следното опредѣление: *Причастията на Есперанто сж отглаголни сжществителни, прилагателни и наречия, които сждържатъ елементъ за време. Тѣ биватъ дейни и страдателни.* Подъ това опредѣление могатъ да се поставятъ всичкитѣ 18 причастни форми. За по-прегледно подредихме тѣзи форми въ по-долу дадената таблица.

Устройството на нашата таблица е следното: Преди всичко тя е раздѣлена на две части: лѣва и дѣсна. Въ лѣвата сж дейнитѣ причастни форми, а въ дѣсната — страдателнитѣ. Въ всѣка отъ тѣзи половини първиятъ отвесенъ стълбецъ съдържа сегашнитѣ, вториятъ — миналитѣ и третиятъ — бждащитѣ. Първиятъ хоризонталенъ редъ и въ дветѣ половини съдържа причастията съ форма на сжществителни, вториятъ — тѣзи съ форма на прилагателни и третиятъ — тѣзи съ форма на наречия. По тази таблица е вече лесно да се именуватъ всички причастни форми. Така:

Формата „bat-anta“ е дейно причастно прилагателно за сегашно време (*aktiva participa adjektivo de estanta tempo*).

Формата „skrib-anto“ е дейно причастно сжществително за сегашно време.

Формата „skrib-inte“ е минало дейно причастно наречие (aktiva participa adverbo de estinta tempo) — това което на другитѣ езици се нарича дѣепричастие.

Формата „am-ato“ е сегашно страдателно причастно сжществително (pasiva participa substantivo de estanta tempo).

Формата „bat-ate“ е страдателно причастно наречие за сегашно време (pasiva participa adverbo de estanta tempo).

Ето нашата таблица на есперантскитѣ причастия:

Форма Formo	ДЕЙНИ Aktivaj			СТРАДАТЕЛНИ Pasivaj		
	сегашно estanta	минало estinta	бждаще estonta	сегашно estanta	минало estinta	бждаще estonta
Сжществ. Substantivoj	anto	into	onto	ato	ito	oto
прилагателни adjektivoj	anta	inta	onta	ata	ita	ota
Наречия adverboj	ante	inte	onte	ate	ite	ote

Причастнитѣ прилагателни и сжществителни, както обикновенитѣ такива, могат да иматъ множество число и винителенъ падежъ. Причастнитѣ сжществителни могат да получатъ и наставката за женски полъ „in“: amatino.

Въ настоящата статия не споменахме много нѣща за причастията,

които могат да се намѣрятъ въ всѣки учебникъ. За сега толкозъ. Въ идущитѣ броеве ще говоримъ за употребата на причастията отдѣлно, въ сложни глаголни времена, образуването имъ отъ различни глаголи и пр. и пр.

Симеонъ Ст. Хесанчиевъ

## Letero pri la deveno de Esperanto

### Писмо за произхода на Esperanto

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia verko, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum ĉi tiu tempo zorge elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Duonjaron post la festo de la 5—17a de Decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri „nova lingvo“, kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi

Тѣй се свърши първиятъ периодъ на езика. Тогава бѣхъ още много младъ, за да излѣзя публично съ съчинението си и решихъ да почакамъ още 5—6 години и въ това време грижливо да изпитамъ езика и напълно да го обработя практически: Половина година следъ празника на 5-17-и декемврий ние свършихме гимназиялния курсъ и се разотидохме. Бждащитѣ апостоли на езика се опитаха да поприказватъ за „новъ езикъ“ и, като срещнаха подигравкитѣ на зрѣли



restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5<sup>1/2</sup> jaroj de mia estado en la universitato mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Ĉi tiu tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn, mi preskaŭ nenie

люде, веднага побързаха да се откажат от езика и азъ останахъ съвсемъ самичкѣ. Като предвиждахъ само подигравки и гонения, решихъ да крия отъ всички работата си. Въ продължение на 5 години до като бѣхъ въ университета никога не говорѣхъ съ нѣкого за моето дѣло. Това време ми бѣше много трудно. Скритостъта



D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof.

estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo — la jaroj de studento pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo kaj foriradis, kaj de tempo al tempo facilgadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo prilaborata de mi. Unu el ĉi tiuj versaĵoj „Mia penso“ mi metis poste en la unuan broŝuron eldonitan de mi; sed al la legantoj, kiuj ne sciis en kiaj cirkonstancoj ĉi tiu

ме измъчваше; принуденъ грижливо да крия мислитѣ и плановетѣ си, азъ почти никжде не ходѣхъ, въ нищо не участвувахъ, и най-хубавото време отъ живота — студентскитѣ години — минаха за мене най-невесело. Понѣкога се опитвахъ да се разсѣя въ обществото, но се чувствувахъ нѣкакъ си чуждъ и се отстранявахъ, и отъ време на време облекчавахъ сѣрдцето си съ нѣкое стихотворение на езика, който обработвахъ. Едно отъ тѣзи стихотворения „Моята мисълъ“ поставихъ после

versaĵo estis skribita, ĝi ŝajnis stranga kaj nekomprenebla.

Dum ses jaroj mi laboris, perfektigante kaj provante la lingvon, — kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi jam ŝajnis, ke la lingvo estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dum en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio „je“, la elasta verbo „meti“, la neŭtrala, sed difinita finiĝo „aŭ“ k. t. p. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forjeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas por la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; sed la praktiko ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekaptetblan *ion*, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivan kaj difinitan *spiriton* (La nesciado de la spirito de la lingvo estas kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed per multpeza, malagrabra stilo, dum

въ първата издадена отъ менъ брошура; но на читателитѣ, които не знаеха при какви обстоятелства бѣше написано това стихотворение, то се струваше чудно и неразбрано.

Въ продължение на петъ години азъ работихъ като усвѣршенствувахъ и изпитвахъ езика, — и имахъ доста работа, макаръ че въ 1878 год. вече ми се струваше, че езикътъ е съвсемъ готовъ. Превеждахъ много на моя езикъ, пишехъ на него оригинални съчинения, и обширни опити ми показаха, че това, що ми се струваше съвсемъ готово на теория, на практика още не е готово. Много нѣщо трѣбваше да окастрия, да заменя, да поправа и коренно да преобразувамъ. Думи и форми, принципи и изисквания се блѣскаха и си пречеа единъ на други, докато на теория, всѣко поотдѣлно и въ кжси опити, ми се струваха съвсемъ добри. Такива нѣща, като напр. всеобщиятъ предлогъ „je“, гѣвкавиятъ глаголъ „meti“, неутралното но опредѣлено окончание „aŭ“ и т. н. вѣроятно никога не биха попаднали въ главата ми на теория. Нѣколко форми, които ми се струваха богатство, сега на практика се показаха ненуженъ баластъ; тѣй напр. трѣбваше да изхвърля нѣколко ненуждни наставки. Въ 1878 г. ми се струваше, че е достатъчно на езика да има граматика и словарь. Че езикътъ бѣше тежъкъ и грубъ, приписвахъ на туй, че още не го владее достатъчно добре; но практиката все по-вече и по-вече ме убеждаваше, че езикътъ се нуждае още отъ нѣкакво неуловимо нѣщо, свързващиятъ елементъ, който дава на езика живъ и опредѣленъ духъ. (Незнаянето духа на езика е причина, дето нѣкои есперантисти много малко чели на

la esperantistoj pli spertaj skribas pes stilo bona kaj tute *egala*, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj ne rimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan *fundamentan* spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon, kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj). — Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte *pensi* en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, jam ne dependantan de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

(Daŭrigota)

езика Есперанто, пишатъ безпогрѣшно, но съ тежъкъ неприятенъ стилъ, докато по-опитнитѣ есперантисти пишатъ съ добъръ и съвсемъ еднакъвъ стилъ, къмъ която народность и да принадлежатъ. Духътъ на езика безъ съмнение съ време ще се измѣни много макаръ малко по малко и незабѣлявано; но ако първитѣ есперантисти, люде отъ различнитѣ народности, не срѣщнѣха въ езика съвсемъ опредѣленъ *ОСНОВЕНЪ* духъ, всѣки би почналь да тегли къмъ своя страна, и езикътъ би останаль останаль вѣчно, или поне много дълго време грубъ и безжизненъ сборъ отъ думи.) — Тогава започнахъ да избѣгвамъ буквални преводи отъ този или онзи езикъ и се мжчехъ направо да мисля на неутралния езикъ. После забелязахъ, че езикътъ въ рѣцетѣ ми престава да бжде безосновна сѣнка на този, или онзи езикъ, съ който си имамъ работа въ тази, или онази минута, и получава свой собственъ духъ, свой собственъ животъ, собствена опредѣлена и ясно изразена физнономия, която вече не зависи отъ нѣкакви влияния. Говорътъ течеше вече самъ гъвкаво, стройно и съвсемъ свободно, както живиятъ бащинъ езикъ.

(Следва краятъ)

## Atentigo al la Esp. grupoj

Per letero №6448 de la 8. III. 1932 j. la Ministerio de Publika Instruado en Sofia rajtigis s-ron Iv. H. Krestanov fari antaŭ la gelernantoj de la mezlernejoj paroladojn je temo „*Esperanto kiel faktoro de klerigo*“ kun demonstracioj kaj bildoj. La sama Ministerio rekomendis la paroladojn de samideano Kre-

stanov al ĉiuj direktoroj kaj gimnazioj kaj intervenis ĉe la Ministerio de fervojoj por faciligi la veturon de l'paroladisto.

La grupoj dezirantaj aranĝi en la lokaj mezlernejoj kaj eventuale ankaŭ publikajn paroladojn, estas petataj sin turni rekte al S ro Krestanov, str. „6 Septemvri“ № 2, Sofia.



ropanoj eĉ ne povas senti tion.

Alia ekzemplo el la citita n-ro 655, de 17. januaro 1932:

*Estis gajnata* por Esperanto ankaŭ...

Tio signifas en aktiva formo ke: ni gajnadis s-ron profesoron Balan, sed ĝis nun ni ne gajnis lin. Tute nekonforma esprimo.

En n-ro 664-a de „Heroldo“ — 20 marto ni trovas sur paĝo 2. kolono 2. linio 10.: devas *esti trovata* iu bazo, sur kiu... Esprimita per simpla tempo tio donas: oni devas trovadi iun bazon... Do, la bazo estas unu, sed oni devas ĝin trovadi (tre klare — multfoje). Laŭ ni serĉadi (longe), sed trovi ĝin signifas la lastan momenton de la serĉado. Tre simple kaj klare: Devas esti trovita... (oni devas trovi).

Similajn ekzemplojn ni trovas ankaŭ en „La gazeto de la XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto“.

En n-ro 3-a, Marto 1932, sur paĝo 38, unua kolono linio 11.: „...kiuj kondamnis lin *esti pendigata* kaj brulligata. Tio signifas, ke oni devis pendigadi lin, se oni nur povas kompreni, ke „*esti pendigata*“ signifas „oni — ados lin“. En la sama kolono, linio 6. de malsupre: „...*estis kondamnata* je gilotina senkapigo. Do, oni sin kondamnadis, sed ĉu fine eldiris la kondamnon? La perfektivan agon oni esprimas per pasinta aŭ estonta tempo.

Ĉiuj ĉi eraraj uzoj igas nin ĉagreni, ke redaktoroj de tiaj grandaj gazetoj ne ankoraŭ komprenas, aŭ volas kompreni tiel klarajn formojn.

Al la slavaj samideanoj ni konsilas ne esti tro pedantaj tradukante el siaj naciaj lingvoj en Esperanton, aŭ en aliajn romana-germanajn lingvojn, ĉar la lastaj ne povas diferencigi tiujn kvar specojn de verboj.

*Simeon St. Hesapčiev*

## Nova Granda Bulgara Vortaro

Jen malofta kaj tre valora fenomeno en la bulgara literaturo rilate al la lingvo. Malofta kaj eĉ la sola! La jam malnoviĝinta ankaŭ bona sisteme vortaro de Najden Gerov ne povas kontentigi la bezonojn de la nuntempa treevoluinta bulgara lingvo.

La vortarego, „Български тълковенъ речникъ“ (Bulgara Klariga Vortaro), komencita de kvar membroj de la Bulgara Akademio de Sciencoj: St. Argirov, St. Mladenov, A. Teodorov-Balan kaj † B. Conev estas aranĝita de St. Mladenov kaj A. Teodorov-Balan — la unua profesoro pri kompara lingvistiko ĉe nia universitato kaj la dua — pri slava filologio.

La nomoj kaj la erudicio de

la kompilintoj jam per si mem garantias bonegan verkon. Klarigante la signifon de la vortoj la kompilintoj uzas ekzemplojn el la malnova bulgara, greka k. a. lingvoj. La multeco de la ekzemploj la detalaj klarigoj pravigas la nomon de „Bulgara Klariga Vortaro“. La tuta verko enhavas proksimume 2000 grandformatajn dukolonajn paĝojn.

Tiu gravega Vortaro enhavas proksimume 100,000 vortojn.

Ni esperu, ke tiu valorega verko malfermos la okulojn de tiuj, kiuj konstante kulpigas nian lingvon, ke ĝi estas malriĉa. Ĝi servu al ĉiuj kiuj volas bone studi la bulgaran lingvon. Al la kompilintoj ni deziras sukceson por ĝia pli rapida eldonado.

## Enlanda kroniko

*Bela Slatina.* Kurson gvidas s-no Iv. Davidov — bankoficisto.

*Dupnica.* La kursoj por kometantoj, kiujn la societo gvidis dum la vintro estas jam en sia fino. Oni intencas malfermi tian por progresintoj.

*Gabrovo.* Granda intereso al Esperanto ĉe la geurbanoj. Kurson gvidas s-ano Iv. Kovaĉev el Ruse.

*Jambol.* La kursoj, kiujn la societo gvidas baldaŭ estos je sia fino. La urbanaro tre intereseme kaj amike rilatas al Esperanto. La societo aranĝos esperantan konferencon je la 7-a kaj 8-a de majo por Sudorienta Bulgarujo. La societanoj regule kunvenas preskaŭ ĉiun dimanĉon.

*Kneĵa.* Kurson gvidas nia samideano At. D. Atanasov — Agro. La intereso al Esperanto, precipe inter la gelernantoj, estas tre granda.

*Sofia.* Nun la societo aranĝas siajn kunvenojn ĉiudusemajne en la sama loko — legejo „Hr. Botev“ str. „Car Simeon“ kaj Bregalnica. Oni legas referatojn, artikolojn, deklamas versaĵojn, rakontas humoraĵojn k. a.

Ĉe la Ĉefa direkcio de la P. T. T. gvidas kurson s-ro At. D. Atanasov — Ada. La sama daŭrigas siajn paroladojn pri Esp-o ĉe „Rodno radio“. Antaŭ nelonge li havis la okan.

En la fino de la marto malfermis

unumonatan kurson s-no P. G. Pamporov.

*Ŝumen.* Societo „Vekiĝo“ malfermis kurson por gelernantoj. Gvidas samideano T. St. Lazarov laŭ la direkta metodo. S-ro direktoro de la knabina gimnazio multe helpis. La entuziasmo kaj intereso pligrandigas. Unue enskribis sin 84 gelernantojn. En la fino de marto vizitadis 106.

*T. Pazarĝik.* La 5-an de marto s-to „Radio“ aranĝis duan vesperfeston, kiu estis bonege vizitita. Ĝi alportis sufiĉe grandan gajnon al la societo. Oni aranĝis tombolon.

La loka ĵurnalo „Podem“ komencas presigi en siaj kolonoj kurson de Esperanto. La sama tre ofte donas sciigojn el nia movado. Al la redakcio ni esprimas niajn bondezirojn kaj gratulojn.

La societo aranĝas regionan konferencon je la 7-a kaj 8-a de majo. La societo dissendas la iuvitilojn.

*Lâĝene.* Kurso estis malfermita je la 15 de Januaro. Gvidis s-ano d-ro Aĝarov.

*Ĉepino-banja.* La kurso, malfermita en la komenco de Februaro ankoraŭ daŭras. Gvidas s-ano Ivan Diviziev, instruisto.

Излъзе отъ печатъ

Излъзе отъ печатъ

# „ЖИВОТЪТЪ НА ЗАМЕНХОФЪ“

Отъ Д-ръ Едмонъ Прива

Преводе Дим. Симеоновъ

На голѣмъ форматъ съ 6 иллюстрации извънъ текста

100 страници

Цена 35 лева

Поръчки до Съюза

## Recenzejo

Malgranda lernolibro de la *Esperanta stenografio* laŭ la sistemo Duployé de P. Flageul. Tria eldono. Prezo 1 fr. franko.

La konata sistemo Duployé unu el la plej gravaj stenografiaj sistemoj kaj la plej uzata en Franclando. Ĝi estas geometria sistemo: ĝiaj elementoj estas strekoj, rondoj kaj arkoj. Kompare al multaj aliaj sistemoj ĝi estas tre facile lernebla pro sia simpleco. La vokalojn oni skribas, sed tio estas en iuj okazoj multe pli facila ol illa simbola esprimado. „A“ kaj „o“ estas rondetoj — la dua pli granda ol la unua. Skribante ilin, oni evitas la angulojn, kiujn en aliaj sistemoj oni devas fari. Krom la alfabeto ekzistas kelkaj signoj por ofte renkontataj sonkompleksoj. Iuj el la literoj havas aldonajn signojn. Ili estas skribataj post kiam oni skribis la tutan vorton. Por skribi oni ne bezonas specialan liniitan paperon. Oni simple kunigas la literojn. Sufiĉas preni la alfabeton kaj legi kun negranda malfacileco. La tuta materialo estas dividita en 6 lecionojn plus unu pri la specialaj ciferoj. Ĉiu leciono havas zorge aranĝitajn ekzercojn kaj trafikajn ekzemplojn.

Dank' al ĝiaj simpleco, facileco kaj klareco al la Esperanta alfaro de la franca sistemo Duployé de Flageul estas aljuĝitaj premioj en internaciaj stenografiaj ekspozicioj: Bruselo 1927 — ora medalo; Parizo 1931 — ĉefpremio.

Ni rekomendas al niaj legantoj lerni tiun ĉi facilegan sistemon.

*Stenografaj desegnoj* en stenografio Duployé — Flageul kun multaj ekzemploj kaj modeloj.

Prezo 1.50 fr. fr. Paĝoj 16.

La lasta numero el la serio eldonata de s-ro P. Flageul estas precipe interesa pro sia enhavo. Multaj desegnoj kaj ekzemploj elmontras la vastan eblon uzi la stenografion en ornamado kaj dekorado ĉiuspecaj. Precipe atentindaj estas la belega arte tranĉita ligna horlogujo, portreto de Zamenhof ornamita telero, balustradoj k. a. Efektive oni provas dirante, ke la stenografio estas ne nur mallonga kaj rapida skribo, sed ankaŭ bela, estetika. El la sama serio estas eldonitaj ankoraŭ: Poezioj de Zamenhof; Amuzaj rakontetoj; Mallongaj prozaĵoj; Amatora iluziisto; kelkaj proziaj perloj.

Fariĝu stenografiisto — malgranda propaganda broŝureto, haveblas enpage ĉe nia redakcio.

„**Esperanto per Esperanto**“ Lernolibro de la lingvo Esperanto laŭ senpera (rekta) metodo. Kun metoda enkonduko. Prilaboris L e o n o V i e n a n o. Eldonejo N. Szapiro Warszawa Nowolipki 8. Prezo zll. 0.75 aŭ 0.20 dolaro. Pola poŝtĉekkonto Warszawa 16. 562.

La sistemon de tiu ĉi libro formas kvar jenaj postuloj pedagogiaj:

1) eblo de instruado laŭ senpera metodo (t. e. ne uzante tradukan ligvon) konformigita al plenkreskuloj sen iuj ajn iloj, aŭ specialaj ilustraĵoj helpe de ordinaraĵoj obejktaj, kiuj troviĝas en ĉiu preskaŭ ĉambro, tono, simplaj movoj kaj gestoj.

2) por eviti la enuigan sistemon de la apartaj frazoj ne interligitaj per iu komuna senco, troviĝas eĉ en la komencaj lecionoj facilegaj rakontoj, kies primitiva stilo respondas precize al la gramatikaj kaj vortaj scioj de la lernanto en koncerna leciono.

3) en ĉiu rakonto troviĝas nur tiaj formoj gramatikaj, kiajn la lernanto jam ekkonis en la antaŭaj lecionoj.

4) la gramatiko estas klarigita laŭ indukta metodo, t. e. el specialaj ĉapitroj gramatikaj la lernanto mem konkludas koncernajn regulojn. El la kvar supre menciitaj punktoj

de la sistemo oni povas facile konkludi, ke la aŭtoro ne intencas sole pligrandigi la nombron de la multaj lernolibroj kaj ĉiuspecaj memlerniloj, sed kiel sperta pedagogo li prilaboris novan kaj originalan sistemon por instruado de la lingvo laŭ senpera metodo al plenkreskuloj.

## Amuzo kaj ŝerco

### KLARIGO

— Paĉjo, kion signifas „ora edziĝo“?

— Kiam iu edziĝas je riĉa fraŭlino kaj oni donas al li la doton en oro.

### LEĜOJ

— Panjo, nia instruisto diris al ni, ke se ne estus la leĝo de la gravito, ĉiuj homoj estus forĵetitaj desur la tero.

— Jes, tiel estas, mia kara infano.

— Sed kiamaniere la homoj sin tenis sur la tero antaŭ ol tiu leĝo estis voĉdonita?

### ABSTINULO

— Kial tiu abstinulo ŝanceliĝas, irante sur la strato?

— Ja, li batalas kontraŭ la alkoholo.

### SIMILECO

Foje Petro-Ruzulo rakontis:

„Ni estis du fratoj — Petro kaj Paŭlo. Estante malgrandaj, ni estis tiom similaj, ke oni ne povis diferencigi nin. Por forigi tiun konfuzon, nia patrino ligis ruĝan fadenon sur la mano de unu el ni kaj tiam oni

diris: „Kiu havas ruĝan fadenon estas Paŭlo, kaj kiu ne havas ruĝan fadenon estas Petro“.

Sed foje okazis malfeliĉo. Banante nin, nia patrino nerimarkinte malligis la ruĝan fadenon kaj tiam oni tute ne povis scii, kiu estas Petro kaj kiu — Paŭlo.

Okazis dua, pli granda malfeliĉo. Unu el ni mortis. Kaj oni ne scias, kiu mortis. Nun mi ne scias ĉu mi mortis, aŭ mortis mia frato. Mi ne scias ĉu mi estas mi, aŭ mi estas mia frato“.

### INTER INTIMAJ AMIKINOJ

— Do, ĉu li kisis vin?

— Jes, ĝuste mi volis diri al li ne fari tion, li simple per la kiso prenis la parolon el mia buŝo.

### PRINTEMPA POEZIO

Ŝi: — Ah, karulo, ĉiam, kiam mi renkontas vin, mi terure maltrankviliĝas.

Li: — Ankaŭ mi, sed nur, renkontante vian edzon.